Karl Friedrich Müchler,

En kel' profunda sidas mi

tradukita de Joachim Gießner

En kel' profunda sidas mi
ĉe plenbarel' da vino
kaj antaŭ mi da vino ĝi
de bona origino.[2]

La vinkelist' laŭ oportun',
li ĝojas, se mi drinkas,
Boneghumore fartas mi -
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Soif' turmentas, ĉi demon',
ĝin devas mi forpeli.
Kaj tre efikas la propon'
per vino tion celi.

La mond' ŝajnigas nun, ke ĝi
sin rozkolore ŝminkas:
Boneghumore fartas mi -
kaj trinkas, trinkas, trinkas.

Sed la soifo kreskas nur
post ĉiu freŝa vino,
la konsekvenc' de la natur'
pro trinkofest' sen fino.

Konsolas min, dum sen konsci'
al planko mi nun sinkas:
Neniun suferigis mi,
sed trinkas, trinkas, trinkas.

Traduko de la Germana poemo "Im tiefen Keller sitz ich hier" de Karl Friedrich Müchler *(∗1763-09-02 – †1857-01-12) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-944-1897 (2013-12-03 19:31:25)

Tiu ĉi traduko troviĝas sub "Weblinks" en la vikipedia paĝo `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_GieΓ§ner`*. La kanto estas interalie aŭdebla en* `http://www.youtube.com/watch?v=GvyJZoqzw-8`*.*

[2] Mi, Manfred Retzlaff, proponas jenan ŝanĝon:
En kel' profunda sidas mi
ĉe plenbarel' da vino.
Ja estas vin' en tiu ĉi
de bona origino.